

Nicola Ruggiero
Universitato de Torino, Italio

Kompili homeran leksikonon por havi vortaron

Resumo: La helena lingvo kaj ties literaturo delonge kaj plu influas la eŭropidan kulturon. Por kompreni pli bone la nuntempon oni nepre devas koni la pasintcon. En la helena verkis ne nur Homero, sed ankaŭ filozofoj kiel Platono kaj Aristotelo, kaj ĝi estis longe komuna lingvo dum la helenisma periodo. Antoni Kofman tradukis kaj publikigis en 1896 la unuajn kantojn de Iliado de Homero el la helena lingvo. Tiu traduko estas nuntempa bazo por nova traduko per nuntempa lingvaĵo. Ambaŭ tradukoj estas nuntempe uzataj de la proponanto de tiu ĉi kontribuo por kompili leksikonon surbaze de la unua kanto de Iliado kaj de oftelistoj de vortoj en tiu sama epopeo. Ĉio ĉi estus la unua paŝo antaŭ ol alfronti diakronan vidpunkton per aldono de leksikonoj kompileblaj el verkoj jam fideinde esperantigitaj (Platono, Nova Testamento, Lukiano de Samosato, ktp.). La rezulto estos libro. En futuro eblos el ĝi havi retejon uzeblan ankaŭ per poŝtelefono aŭ eĉ havi apartan apon por tiu celo. Per tiu libro certe eblos pli efike havi fidindajn tradukojn. Kiuj estas modernaj instrumentoj por kompili vortaron kaj ĉu la Esperanto-komunumo bezonos tian vortaron? La proponata artikolo temos pri leksikografio, traduk-arto kaj literaturo.

Ŝlosilvortoj: Homero; Helena lingvo; Esperanto; Leksikono; Vortaro

1 Enkonduko

Iliado kaj Odiseado estas du epopeoj tradicie atribuitaj al Homero kaj konsideritaj ĉefverkoj de la helena civilizacio. La prikantitaj okazintaĵoj datiĝas ĉirkaŭ la 13a jarcento a.K. laŭ arkeologiaj fontoj (Bryce 2002, 182–195), sed la kreiĝtempo de la du epopeoj estas ankoraŭ disputata: laŭ Martin L. West Iliado cirkulis jam ĉirkaŭ 630 a.K. (West 1999, 364); ĉu la poeto mem skribis ĝin aŭ helpis per diktado al alia manskribisto, tion eblas nur konjekti. Antaŭa silaba alfabeto perdiĝis samtempe al la micena civilizacio kaj nur ĉirkaŭ la 8a jarcento a.K. la helenoj enportis foneman alfabeton de la fenicoj adaptante ĝin kaj dum la 7a kaj 6a jc. a.K. multaj urboj eldonis sian version de la homeraj epopeoj. La atena iĝos la ĉefa eldono pro la filologoj en Aleksandrio dum la 3a kaj 2a jc.

La lingvo de la epopeoj estas la helena, t.e. la antikva greka, sed – pli specife – aparta dialekto, t.e. varianto, nomita laŭ la supozita aŭtoro: la homera. La homera dialekto estas fake nomata *Kunstsprache* (Meister 1921): ĝi estas artefarita ĉar ĝi ekzistis nur en la daŭro de la recitado aŭ kiel kristaligita teksto. Ĝin oni nomas ankaŭ *kunmetita* lingvo, ĉar bazita sur la ionia (ĉefe) kaj eolia dialektoj de la helena lingvo.

Antoni Kofman (Homero 1896) esperantigis kaj publikigis en 1896 la unuajn ses rapsodiojn de Iliado, dum Manders (Homero 1932) tradukis la tutan Odiseadon kaj publikigis ĝin en 1933. La tradukoj estas gravaj ne nur laŭ literatura, sed ankaŭ laŭ lingva intereso: pro tio, ke pasis jam pli ol cent jaroj, eblas analizi laŭ diakrona vidpunkto la lingvon de la traduko kaj vortprovize kaj sintakse, kaj per tio prezentigaŝ oportuno por kompili leksikonon.

Tiu ĉi eseo esploras la procedon pri la kompilado de homera leksikono per analizo de jam ekzistantaj kaj nuntempe kreataj esperantigoj. La fina celo estos krei sufiĉe riĉan kaj precizan dulingvan vortaron kiu estos bazo por diakrona dulingva vortaro de la helena lingvo al Esperanto.

2 Komenca trarigardo

2.1 Ekzistantaj leksikonoj

En tiu ĉi sekcio mi parolos pri jam ekzistantaj leksikonoj de la homera, kiujn mi havas je dispono. La unua kaj fakte la plej ampleksa estas en latino: *Lexicon Homericum* ĉefredaktita de Ebeling kaj aliaj kunlaborantoj (Ebeling 1885).

La dua estas *Homeric Dictionary* de Autenrieth: li kompilis germanlingvan leksikonon kaj Robert Porter Keep angligis ĝin en 1876 (Autenrieth 1873/2001). Ĝin konsistigas ĉirkaŭ 9000 kapvortoj, inkluzive de personaj kaj geografiaj nomoj. Ĝi troveblas interrete kaj ĉe *Perseus Digital Library* kaj ĉe *Logeion*.

Ĉe *Logeion* troveblas ankaŭ *A Lexicon of the Homeric Dialect* redaktita de Cunliffe (2012) originale en la angla: la unua eldono malinkluzivis personajn nomojn, sed en lastaj eldonoj aperis suplemento kun personaj kaj geografiaj nomoj.

Oreste Nazari (1939) kompilis *Dialecto omerico grammatica e vocabolario*, itallingvan leksikonon bazante sian laboron sur la leksikonoj de Ebeling (1885) kaj Autenrieth (1873).

2.2 Mallonge pri la esperantigoj

En la komenca periodo de la esperantlingva literaturo, specialan fokuson oni donis al la tradukoj. Ne hazarde Zamenhof tradukis Hamleton de Shakespeare, el Goethe kaj la Malnovan Testamenton.

Abraham Antoni Kofman (1865–1940) fine de la 19a jc. ektradukis Iliadon: plene la unuajn kvin rapsodiojn, dum la sesan nur ĝis la verso 310a (do mankas 219 versoj). Ili aperis en 1896 en la serio *Biblioteko de la Lingvo Internacia Esperanto* (Homero 1896) kaj la unua rapsodio aperos poste ankaŭ en *Fundamenta Krestomatio* (Zamenhof 1903, 441–458). Lastatempe, la aŭtoro de tiu ĉi eseo retradukis la unuan rapsodion, dum akademiano Brosch tradukis ĝis la kvina (Homero 2024).

Wilhelmus Johannes Arnoldus (Wiel) Manders (1910–1998) tradukis proze la tutan Odiseadon kaj publikigis ĝin en 1933 (Homero 1932): malkiel Kofman, li ne esperantigis la nomojn redonante ilin per simpla transskribo. Abel Montagut (persona komuniko), poeto konata en la Esperanto-literaturo pro *Poemo de Utnoa*, versigis la tradukon de Manders kaj nuntempe finpoluras la tekston.

Traduki t.n. klasikajn verkojn de difinita civilizacio al artefarita lingvo signifas labori plu pri tutmonda homaranismo laŭ la zamenhofaj principoj: neniel por montri arogantan kaj fisupozitan superecon de tiu civilizacio, sed por aldoni plian buntan eron al la mozaiko de la monda kulturo al kiu strebas la Esperanto-komunumo.

3 Metodologio

Pro tio, ke mia tasko, kaj ĉefa sed ne ununura celo de tiu ĉi eseo, komenciĝis ĉirkaŭ Iliado, mi opinias oportune konsideri la tri tradukojn ĝis nun ekzistantajn: Kofman (K), Ruggiero (R), Brosch (B). Ekde nun, per ‘originalo’ mi celos nur la eldonon de Monro kaj Allen troveblan ĉe Perseus en la korpusaj retejoj de Tufts-Universitato (*Perseus Digital Library* 2024), Scaife-legilo (*Scaife Viewer* 2024) kaj Universitato de Chicago (*Chicago Perseus* 2024): plejofte ili identas, sed povas okazi, ke la filologoj en ties redakcejoj plenumis subtile diferencajn elektojn. Leganto scias, ke eĉ sole la apero aŭ neapero de komo povas ŝanĝi la sencon de tuta frazo. Pro tio, ke mi mem ne estas klasika filologo, sed nur lingvisto, mi adoptos *argumentum ab auctoritate*, aŭ kiel diris la kleruloj en la eŭropa Mezepoko, mi grimpos sur la ŝultrojn de la ĝigantoj.

Nur por ekzempli, mi prezentos la unuajn sep versojn de la unua rapsodio. Mi prezentos la originalon (H), gramatikan kaj morfologian analizon, laŭvortan tradukon kaj la tradukojn de K, R, B. Tio iel reflektos la manieron

uzatan por proksima legado, nepra por tradukado. Estas memevidente, ke por taŭge traduki oni devas kompreni la originalon laŭ ĝia gramatiko, semantiko kaj kulturo, por redoni ĝin en oportuna stilo de la cel-lingvo.

4 Procedo

Kvankam ne eblis tute ignori la tradukon de Kofman, kaj pro komparanalizaj kaj klarigaj kialoj ne indus ignori nacilingvajn tradukojn, mi provis unue esperantigi la tutan unuan rapsodion sendepende de la aliaj tradukoj por ne ricevi tro da influoj kaj pri la lingvaĵo kaj pri la stilo. Fakte, la homera lingvaĵo ŝanĝiĝas laŭ la poezia rolulo parolanta, sed ĝenerale ĝi estas relative plata kaj apenaŭ pompa; krome, multaj fiksjaj frazeroj ripetiĝas ofte laŭ tre difinita skemo. Se paroli pri la plej fama italo de Iliado fare de Monti (Homero 1825): en ĝi la leganto renkontas tre solenan lingvaĵon kaj intencan eviton pri ripetado de samaj vortoj aŭ frazeroj, ĉar alie tio aspektus mizera laŭ la tradiciaj reguloj de la itala poezia lingvo. Tamen, mia tasko estis kaj estas resti lojala al Homero kaj al la rapsoda poezia lingvo.

Iliado 1,17

- | | | | | | | | |
|-----|---|--|---------|-------------|-------------|-----------|----------|
| (1) | H | Mῆνιν | ἄειδε | θεὰ | Πηληϊάδεω | Ἀχιλῆος | |
| | | AKU.SG | IMP.2SG | VOK.F.SG | GEN.SG | GEN.SG | |
| | | Koleron | kantu | diino | de Peleido | de Aĥilo | |
| | K | Kantu, diino, koleron de la Peleido Aĥilo, | | | | | |
| | R | Kantu, diin', de Peleid' Aĥilo la koleron | | | | | |
| | B | La koleron prikantu, diino, de Peleido Aĥilo, | | | | | |
| (2) | H | οὐλομένην, | ἣ | μυρί' | Ἄχαιοῖς | ἄλγε' | ἔθηκε, |
| | | AKU.SG | RIL | AKU.PL | DAT.PL | AKU.PL | AOR.3SG |
| | | detruan | kiu | sennombrajn | al Aĥajanoj | suferojn | kaŭzis |
| | K | ĝin, kiu al la Aĥajoj kaŭzis mizerojn sennombrajn, | | | | | |
| | R | detruan kiu suferigis sennombre Akeojn, | | | | | |
| | B | la pereigan, kiu al la aĥajoj multegajn dolorojn kaŭzis, | | | | | |
| (3) | H | πολλὰς | δ' | ἰφθίμους | ψυχὰς | Ἄϊδι | προΐαψεν |
| | | AKU.PL | PKL | AKU.PL | AKU.PL | DAT.SG | AOR.3SG |
| | | multajn | kaj | bravajn | animojn | al Hadeso | ĵetegis |
| | K | Kaj en Aidon deĵetis multegajn animojn kuraĝajn, | | | | | |
| | R | kaj sendis al Hadeso multegajn bravajn animojn | | | | | |
| | B | multajn kuraĝajn animojn de la herooj ĵetis | | | | | |

- (4) H ἡρώων, αὐτοὺς δὲ ἑλώρια τεῦχε κύνεσσιν
 GEN.PL AKU.PL PKL AKU.PL IMPF.3SG DAT.PL
 de herooj, ilin kaj predoj igis al hundoj
 K De herouloj kaj faris korpojn iliajn akiro
 R de herooj kaj igis mem ilin predoj por hundoj
 B antaŭ Hadeso, sed ilin mem predoj faris por la hundoj
- (5) H οἰωνοῖσί τε πᾶσι, Διὸς δ' ἐτελείετο βουλή,
 DAT.PL PKL DAT.PL GEN.SG PKL IMPF.MED.3SG NOM
 al birdoj kaj al ĉiuj de Zeŭso kaj plenumiĝis la volo
 K Al rabobirdoj kaj hundoj – fariĝis la volo de Zeŭso –
 R kaj ĉiuj rabobirdoj; kaj plenumiĝis de Zeŭso
 B kaj por ĉiuj birdoj – efektiviĝis la decido de Zeŭso
- (6) H ἐξ οὗ δὴ τὰ πρῶτα διαστήτην ἐρίσαντες
 PREP RIL PKL ART.N.PL N.PL AOR.3DU AOR.PTCP.DU
 de kiam jam unue sin apartigis kverelinte
 K De tiu tago, de kiu disigis sin ekdisputinte
 R la volo, ekde kiam sin apartigis kverele
 B de kiam jam unue disiĝis malpaciĝinte
- (7) H Ἄτρεΐδης τε ἄναξ ἀνδρῶν καὶ δῖος Ἀχιλλεύς,
 NOM.SG PKL NOM.SG GEN.PL PKL NOM.SG NOM.SG
 Atreido kaj mastro de soldatoj kaj dia Aĥilo
 K La ordonanto al viroj, Atrido, de l' dia Aĥilo.
 R de l' viroj l' mastro Atreido, kaj dia Aĥilo.
 B kaj la Atreido, mastro de la adoltiĉoj, kaj brila Aĥilo.

Evidentas, kiel ĉe Kofman aperas vortoj nun konsiderataj ĉu eraraj ĉu arkaismaj: *Aĥajoj*, *herouloj*. Krome, mirigas *Aido* por *Hadeso*, kaj *Atrido* anstataŭ la pli regula *Atreido*.¹ Brosch uzas apartan varianton de Esperanto, nome parentismon (Brosch 2021), kiu videblas ĉe *adoltiĉoj* en la 7a verso. Tio estas plenrajta elekto, kiun mi tamen ne pretas subteni. Krome, li plu uzas la arkaismon *Aĥajoj* laŭ la spuroj de Kofman, kvankam *Aĥajo* estas la nomo por la regiono en uzo jam ĉe la esperantigo de la *Nova Testamento* (IKUE kaj KELI 2006) kaj en *Quo vadis* (Sienkiewicz 2016).²

1 Pri la transskribo de helenaj propraj nomoj mi sendas la leganton al interesa kaj ne malhavebla artikolo de Degoul (2014).
 2 La *Novan Testamenton* kaj *Quo vadis* mi konsultis per Tekstaro (2024).

5 Pri la teknika flanko

Por kompili la leksikonon mi bezonis kompreni kiel stoki la datumojn, t.e. la kapvortojn kun ties difinoj, uz-ekzemploj kaj aliaj eblaj utilaj informoj. Mi bezonis efikan manieron konservi daŭripove la tekstojn, pro tio mi fiksas al mi la sekvantajn kriteriojn:

- Ĉio devas esti legebla per ajna operaciuma sistemo. La dosiero do devos esti legebla sen problemoj pri konvertado ĉu per Vindozo, Linukso aŭ Makintoŝo.
- La dosiero devas esti tuj legebla, per minimuma uzo de kodoj. La grafemoj devas aperi Unikode.
- La dosiero devas esti facile printebla kaj por persona uzo (efektiva uzo por traduki aŭ por revizia fazo) kaj por fina publikigo libroforme.

Laŭ tiuj kriterioj, ne eblis uzi WYSIWYG-redaktilojn kiel LibreOffice, Office Word aŭ Google Docs: kvankam ĉiu el ili havas avantaĝojn, tamen ekzistas granda risko perdi aranĝ-informojn okaze de ŝanĝo de operaciuma sistemo uzata aŭ de ĝisdatiĝo de la programo mem.

Per reta esploro pri lingvistikaj iloj mi trovis interesan programon: *Field-Works* (2014), de SIL. Tamen, ĝi estas granda programo kiu bezonas longan ekzercadon, lernadon kaj hardvarajn kriteriojn kiujn mi ne povis plenumi.

Alia maniero uzata de nuntempaj retaj vortaroj estas XML (*Extensible Markup Language [XML]* 2024). XML estas tre fleksebla komputila lingvo: laŭ la cel-uzo oni devas regi apartan kaj difinitan datenaranĝadon. Sukcese uzas XML-n por Esperanto *Reta Vortaro* (2024), *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 2020* (Waringhien ĉefred. 2020), dum por la helena *Logeion* (2024) kaj *Diccionario Griego-Español* (2024). Ankaŭ Fieldworks uzas XML-datenaranĝadon. Tamen, mia kono pri komputilaj lingvoj estas tre limigita kaj mi ne volis, ke tio entute malebligos la komencan fazon de la leksikon-kompilado.

Lexonomy montras uz-afablan aliron, sed dependi de aliula servilo kiu povus kiam ajn malaperi estis tro granda risko.

Fine, la elekto iris al \LaTeX kaj specife $X_{\text{H}}\LaTeX$ pro ĝia denaskeco kun Unikodo: \LaTeX estas sistemo de teksta kompostado. Mi lernis uzi ĝin por mia bakalaŭra disertaĵo kaj mi sentis min jam konfidenca en ĝi. Fakte, trovinte ŝablonon por vortaro, mi povis relative facile kaj rapide adapti ĝin por mia celo.

\LaTeX ebligas al mi havi dosieron facile legeblan en ajna operaciuma sistemo eĉ per simpla teksto-redaktilo, eblas uzi aŭ ankaŭ nur konservi ĝin ĉe ret-stokejoj kiel Google Drive aŭ DropBox aŭ retaj \LaTeX -serviloj kiel *Overleaf, Online LaTeX Editor* (2024). Ĝi ebligas la kreon de pdf-dosiero, por hejma printado aŭ por fina eldonado.

6 La kompilado

Dum la jaroj mi trovis kaj uzis plurajn retajn ilojn kaj por traduki kaj por faciligi la leksikon-kompiladon.

La korpusaj retejoj *Perseus Digital Library*, *Scaife Viewer* kaj *Chicago Perseus* funkcias relative simile: per simplaj klakoj eblas tuj vidi morfologian analizon de ĉiu unuopa vorto, kaj donas ligilon al vortaro. *Perseus Digital Library* kaj *Scaife Viewer* al sia interna, dum *Chicago Perseus* al *Logeion*. Lastatempe mi uzas nur *Chicago Perseus* pro tio, ke ĝia konkordancilo ebligas malpli komplikan sed tamen informodonan morfologian serĉon: eblas enketi la serĉilon tiel ke ĝi montras efektivajn formojn uzitajn de aparta vorto; tio estas aparte utila por aldoni informojn pri la paradigmoj sed ankaŭ por trovi interesajn uz-ekzemplojn citindajn ne nur el Iliado sed ankaŭ el Odiseado.

La komenca fazo de la kompilado konsistis en serĉado en pluraj vortaroj de la unuopaj vortoj, tiel komparante la uzon ankaŭ en la originalo kaj en la haveblaj tradukoj. Mi kompiladas la leksikonon sekvante la sinsekvon de la versoj. Tio estis utila por malperdi la fadenon pri la okazintaĵoj kaj la roluloj, sed iom elĉerpige pro la tien-reen-irado tra la kapvortoj. Poste, mi bezonis konkretan liston de kapvortoj efektive aperintaj en la koncerna rapsodio. Por tion fari mi uzis la vortaran ilon ĉe *Perseus Digital Library* kaj *Scaife Viewer*. Per ĝi mi kreis liston de ĉiu aperinta kapvorto kaj en la unua rapsodio (1.222) kaj en la tuta poemo (ĉirkaŭ 9.000). Tiu listo estas memkompreneble tre utila kiel bazo, sed samtempe ne eblis fidi blinde. Kelkfoje kapvorto ripetigis pro plursignifeco, alifoje indus esplori iom pli detale ĉu la koncernan kapvorton ne eblus analizi alimaniere. Ekzemplo pri tio estas ἄρα (kiu povas aperi ankaŭ kiel ἄρ aŭ ῥα) aŭ aliaj vortoj kiuj aperas hapakse aŭ verboj mankaj je tenso aŭ modo.

Krome, mi profitas de malnovaj sed ankoraŭ utilaj verkoj: ofteco-listoj, utilaj por instruaj kaj lernaj celoj (Owen kaj Goodspeed 1909). Tiuj ofteco-listoj ŝajnas konfirmitaj ankaŭ de la nuntempa teknologio: ellistigo per la Perseus-vortarilo donas similajn rezultojn.

7 Ekzemploj

Se repreni la unuan version antaŭe analizitan, mi provos ekzempli kiel konkrete mi agis.

(1)	H	Mῆνιν	ἄειδε	θεᾶ	Πηληϊάδεω	Ἀχιλλῆος
		AKU.SG	IMP.2SG	VOK.F.SG	GEN.SG	GEN.SG
		Koleron	kantu	diino	de Peleido	de Aĥilo
	K	Kantu, diino, koleron de la Peleido Aĥilo,				
	R	Kantu, diin', de Peleid' Aĥilo la koleron				
	B	La koleron prikantu, diino, de Peleido Aĥilo,				

Μῆνιν estas la akuzativa formo de *μῆνις*, kolero. Substantiva kapvorto estas normale menciita en nominativo plus la finaĵo de la genitivo kiu donas informon pri la deklinacio. Mi serĉis per la konkordancilo ĉe *Chicago Perseus* ĉu tiu vorto aperis en genitivo (aŭ aliaj kazoj) simple per 'lemma:μῆνις' limigante la serĉon nur ĉe Homero: la rezulto informis, ke estas 12 trafoj en akuzativo, 3 en nominativo, 1 en genitivo (*μήνιος*, Odiseado 3,135). Aldone, laŭ kutimo en helena leksikografio oni aldonas la genron uzante la respondan artikolon en la helena *ἡ*, do temas pri substantivo ingenra.

ἄειδε estas tenso prezenco, aktivo, modo imperativo, dua persono singulara de la unua konjugacio en *-ω*: *ἀείδω*. Tipa homera longigita formo anstataŭ la atika mallongigita *ἄδω*. Ankaŭ por *ḡi* eblas serĉi en la konkordancilo 'lemma:ἀείδω' por trovi eventualajn neregulajn formojn kiujn oni povus aldoni informcele en la difino-kampo de la leksikono. Ekzemple, *ἄεισον* (aoristo, aktivo, imperativo, 2a singulara) ne havas la kutiman aŭgmenton, kaj do estas interese aldoni tiun informon.

θεᾶ estas la vokativa formo de *θεά*. Similprocede kiel antaŭe, oni rimarkas, ke la genitivo finiĝas je *-ᾶς*, kaj pro tio ke *ḡi* estas ingenra *ḡi* ricevos la respondan artikolon *ἡ*.

Πηληϊάδεω estas la genitivo de *Πηληϊάδης*, kune al *Πηληϊάδαο*. Alia formo de tiu ĉi patronomo estas *Πηλεΐδης* kaj ties genitivo estas *Πηλεΐδεω*, *Πηλεΐδαο*. Tria formo estas *Πηλείων*, kaj genitivo *Πηλείωνος*. Ĉi-lasto formo ricevas 48 trafojn, la dua 53, la unua 12. La trafoj helpas kompreni kiun kapvorton elekti por doni la difinon, dum la aliaj kapvortoj havos resend-simbolon al la ĉefa kapvorto.

Ἀχιλῆος estas la genitivo de *Ἀχιλλεύς*, ĉi-lasto trovebla ankaŭ kiel *Ἀχιλλεύς*.

8 Konkludo

Post rapida trarigardo de la epopeoj kaj ties lingvo, mi menciis la ekzistantajn esperantigojn. Ili estas interesaj kaj laŭ lingva kaj laŭ literatura vidpunktoj.

Cele al kompilado de leksikono, la plej unua ŝtupo por tion plenumi estas legi proksime la verkojn, nome verson post verso, vorton post vorto, kaj analizi ilin gramatike kaj morfologie, por fine noti tion en datumbazo. Post esplorado pri la eblaj solvoj, mi fine adoptis Latex-on ĉar *ḡi* ŝajnas al mi plej daŭripova (legebla kaj redaktebla per simpla teksto-redaktilo en ajna operaciumsistemo), legebla por homo (per minimuma uzo de kodoj), efika por ricevi printeblan pdf-dosieron.

Krom pri ekzistantaj leksikonoj, mi profitis grande je retejaj korpusoj (kun aparta prefero al *Chicago Perseus*) kaj oftenco-listoj.

Sekva fazo de la leksikono estos *ḡia* haveblo per vere cifereca formo, enketebla per serĉilo.

Krome, Homera leksikono povas esti bona bazo por diakrona vortaro pri la helena lingvo. En Esperanto jam aperis elhelenigoj de multaj mallongaj poemoj, sed ankaŭ de gravaj verkoj de Platono (el kiuj nepre elstaras Respubliko, Platono 2012). Krome, ni havas du malsamajn tradukojn de la Nova Testamento: unu fare de la londona komitato en Biblio kaj la alia fare de Gerrit Berveling (La bona mesaĝo de Jesuo 2012; Leteroj de Paŭlo kaj lia Skolo 2004; Flanke je Jesuo 2010). Berveling ankaŭ tradukis multajn verkojn de Lukiano de Samosato. Kompara laboro ĉirkaŭ tiuj esperantigoj ebligas aldoni novajn kapvortojn aŭ signifojn, tiel ampleksante la ĉi-esee koncernan verkon el leksikono al vortaro. Certe tia vortaro estas nemalhavebla helpo por estontaj tradukistoj havi fidindan ilon por labori profite.

Bibliografio

- Autenrieth, Georg. 1873. *Wörterbuch zu den Homerischen Gedichten*. Leipzig: Teubner. – Georg Autenrieth. 2001. *Homeric Dictionary*, tradukis Robert Porter Keep. Represo de la 4-a eld. 1886. Newburyport, MA: Focus Publishing.
- La bona mesaĝo de Jesuo*. 2012. Tradukis Gerrit Berveling. Chapecó: Fonto.
- Brosch, Cyril. 2021. Ĝi-parentismo. <https://www.cyrilbrosch.net/bd/ghi-parentismo> (19.03.2024).
- Bryce, Trevor R. 2002. "The Trojan War: Is There Truth behind the Legend?" *Near Eastern Archaeology* 65, kajero 3: 182–195. <https://doi.org/10.2307/3210883> (15.01.2024).
- Chicago Perseus*. 2024. <https://perseus.uchicago.edu/> (15.01.2024).
- Cunliffe, Richard John. 2012. *A Lexicon of the Homeric Dialect*. Ampleksigita eld. Norman, OK: University of Oklahoma Press.
- Degoul, Francisko. 2014. "Transskribo de propraj nomoj helenaj (escepte de nomoj hebredevenaj)." *Sennacieca Revuo*, kajero 142: 33–57.
- Diccionario Griego-Español*. 2024. <http://dge.cchs.csic.es/> (13.01.2024).
- Ebeling, Heinrich, red. 1885. *Lexicon Homericum*. Vol. 2. Leipzig: Teubner.
- Extensible Markup Language (XML)*. 2024. <https://www.w3.org/XML/> (15.01.2024).
- FieldWorks*. 2014. <https://software.sil.org/fieldworks/> (13.01.2024).
- Flanke je Jesuo* (2010). *La Nova Testamento*, tradukis Gerrit Berveling. Vol. 3. Zwolle: VoKo.
- Homero. 1825. *Iliade*, tradukis Vincenzo Monti. [https://it.wikisource.org/wiki/Iliade_\(Monti\)](https://it.wikisource.org/wiki/Iliade_(Monti)) (23.04.2024).
- Homero. 1896. *Iliado*, tradukis A. Kofman. Nurnbergo: Presejo de W. Tümmel. (Biblioteko de la Lingvo Internacia Esperanto, 76). <https://upload>.

- wikimedia.org/wikipedia/commons/f/f5/Homero_-_Iliado%2C_1896%2C_Kofman.pdf (11.01.2024).
- Homero. 1932. *Odusseias de Homeros*, tradukis W. J. A. Manders. Zutphen: W. J. Thieme. https://bitoteko.esperanto.es/xmlui/bitstream/handle/11013/6383/Homero_Odusseias_1935.pdf (20.03.2024).
- Homero. 2024. *Iliado*, tradukis Cyril Brosch. <https://www.cyrilbrosch.net/bd/tradukoj/iliado> (15.01.2024).
- IKUE kaj KELL, red. 2006. *Biblio*. Dobřichovice: Kava-Pech.
- Latex. 2024. <https://www.latex-project.org/> (15.01.2024).
- Leteroj de Paŭlo kaj lia Skolo*. 2004. Tradukis Gerrit Berveling. Chapecó: Fonto.
- Lexonomy*. 2024. <https://www.lexonomy.eu> (13.01.2024).
- Logeion*. 2024. <https://logeion.uchicago.edu> (13.01.2024).
- Meister, Karl. 1921. *Die Homerische Kunstsprache*. Leipzig: Teubner.
- Nazari, Oreste. 1939. *Dialecto omerico grammatica e vocabolario*. Torino: Chiantore.
- Overleaf, Online LaTeX Editor*. 2024. <https://www.overleaf.com> (13.01.2024).
- Owen, William Bishop kaj Edgar Johnson Goodspeed. 1909. *Homeric Vocabularies*. Chicago: The University of Chicago Press.
- Perseus Digital Library*. 2024. <http://www.perseus.tufts.edu/hopper/> (15.01.2024).
- Platono. 2012. *La Respubliko*, tradukis Donald Broadribb. Novjorko: Mondial.
- Reta Vortaro*. 2024. <https://www.reta-vortaro.de> (13.01.2024).
- Scaife Viewer*. 2024. <https://scaife.perseus.org/> (15.01.2024).
- Sienkiewicz, Henryk. 2016. *Quo vadis*, tradukis Lidja Zamenhof. 3-a eld. Bjalistoko: Podlažia Biblioteko / Świdnik: Libro-Mondo / Đurđevac: DEC.
- Tekstaro de Esperanto*. 2024. <https://tekstaro.com> (22.03.2024).
- Waringhien, Gaston, ĉefred. 2020. *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*. Nova eld. kunordigita de Michel Duc Goninaz kaj K. Roux. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda. <https://vortaro.net> (12.06.2024).
- West, M. L. 1999. "The Invention of Homer." *The Classical Quarterly* 49, kajero 2: 364–382. <https://www.jstor.org/stable/639863> (15.01.2024).
- Zamenhof, L. L. (Ludwik Lejzer). 1903. *Fundamenta Krestomatio de la Lingvo Esperanto*. Paris: Hachette. <http://data.onb.ac.at/dtl/7430996> (22.03.2024).

Pri la aŭtoro

Nicola Ruggiero BA-diplomiĝis ĉe Universitato de Islando pri lingvoj kaj literaturoj islanda kaj angla per disertaĵo pri la memtradukado en la verkado de Baldur Ragnarsson. Nuntempe magistriĝas pri lingvistiko ĉe Universitato de Torino.

Retadreso: nicola.ruggiero@edu.unito.it

ORCID-numero: 0009-0005-6251-3885

About the author

Nicola Ruggiero graduated from University of Iceland with a degree in Icelandic and English languages and literatures. His dissertation focused on self-translation in Baldur Ragnarsson's poetic works. Currently, he is completing a Master's degree in Linguistics at the University of Turin.

Sull'autore

Nicola Ruggiero ha studiato lingue e letterature islandese e inglese all'Università d'Islanda con una tesi sull'autotraduzione nel lavoro poetico di Baldur Ragnarsson. Attualmente sta ultimando la magistrale in linguistica presso l'Università di Torino.

Compiling a Homeric lexicon to get a dictionary

Abstract: The Greek language and its literature have influenced European culture for centuries, right up to the present day. To better understand the present, one must necessarily know the past. Homer wrote in this language, as did philosophers like Plato and Aristotle, and it was a common language during the Hellenistic period.

Antoni Kofman translated and published the first books of Homer's Iliad in 1895 from the Greek language. This translation serves as a modern basis for a new translation using contemporary language. Both translations are currently used by the author of this paper to compile a lexicon based on the first book of the Iliad and frequency lists of words in the same epic.

All this is intended to be the first step before taking a diachronic perspective by adding lexicons from works already reliably translated into Esperanto (Plato, the New Testament, Lucian of Samosata, etc.).

The result will be a book. In the future, it will be possible to have a website usable also on a smartphone or even have a separate app for that purpose. The book is intended to make reliable translations more widely available and in a more effective manner.

What are the modern tools for compiling a vocabulary, and will the Esperanto community need such a vocabulary? The proposed article will focus on lexicography, translation art, and literature.

Keywords: Homer; Greek language; Esperanto; Lexicon; Vocabulary; Dictionary

Compilare un lessico omerico per avere un dizionario

Resumen: La lingua greca e la sua letteratura hanno influenzato la cultura europea fino ai nostri giorni. Per comprendere meglio il presente, bisogna necessariamente conoscere il passato. Omero scrisse in questa lingua e anche filosofi come Platone e Aristotele, ed era una lingua comune durante il periodo ellenistico.

Antoni Kofman ha tradotto e pubblicato nel 1895 i primi libri dell'Iliade di Omero dal greco. Questa traduzione funge da base moderna per una nuova traduzione che utilizza il linguaggio contemporaneo. Entrambe le traduzioni sono attualmente utilizzate dal proponente di questo contributo per compilare un lessico basato sul primo libro dell'Iliade e liste di frequenza di parole della stessa epopea.

Tutto questo sarebbe il primo passo prima di affrontare una prospettiva diacronica aggiungendo lessici di opere già tradotte in esperanto in modo affidabile (Platone, Nuovo Testamento, Luciano di Samosata, ecc.).

Il risultato sarà un libro. In futuro sarà possibile avere un sito web utilizzabile anche su smartphone o addirittura un'applicazione separata per questo scopo. Attraverso questo libro, le traduzioni affidabili saranno certamente disponibili in modo più efficiente.

Quali sono gli strumenti moderni per compilare un vocabolario e la comunità esperantista avrà bisogno di un tale vocabolario? Il articolo proposta si concentrerà sulla lessicografia, l'arte della traduzione e la letteratura.

Parole chiave: Omero, lingua greca, esperanto, lessico, vocabolario, dizionario